# LA PACDEFENDANTO

N-o.40. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEHOSLOVAKIO Aprilo 1955

La batalo por defendi la mondpacon jam atingis sian kulminacion.La teruraj amasmortigiloj, la atom-kaj hidrogenbomboj starigis la homaron antaŭ la alternativo elekti vivon aŭ pereon.En čiuj landoj kaj mondpartoj la homoj sin organizas al batalo kontraŭ la sangavidaj frenezuloj, kiuj intencas pereigi la mondon. Nur unu grava manko ankoraŭ montriĝas.La homoj en diversaj landoj komprenas diversmaniere la vorton PACO.Jes fakte ankaŭ temas pri diversaj pacoj.La unuaj kontentiĝus kun tia paco,dum kiu la kapitalistoj ilin sendefende daŭrigus subpremi kaj ekspluatadi.Ankaŭ Adolf Hitler senčese deklaris,ke li ne volas sangveršadon,nek militon kaj dume li celis,ke čiuj ceteraj europaj nacioj sin submetu kiel malpli valoraj popoloj sub la jugo de lia,t.nomata "Herrenvolk"/Sinjora popolo/. Sed kiam la aliaj nacioj ne konsentis kun tia "tombeja paco", li kruele atakis kaj perforte subpremis ilin. Fine Hitler pro sia frenezeco mem pereis kaj ankoraŭ hodiaŭ la germana popolo suferas la sekvojn de liaj teruraĵoj,kvankam jam pasis multaj jaroj.Sed la homoj, kiuj tiam Hitler-on instigis ja eč malavare subtenis en lia krueleco ne multe lernis el liaj spertoj.Dume la vundoj de la popoloj ankoraŭ ne resaniĝis,ili jam denove deziras"unuigi Europon" pere de minaco kun atom-kaj hidrogenbomboj. Kompreneble,la pli progresema parto de la homaro prave rifuzas kaj defendas sin akcepti denove tian "tombejan pacon".Či lasta ankaŭ arde deziras pacon,sed pacon tian,kiu samtempe garantias plenan LIBERECON kaj ne vivon sur genuoj,sub komando de iu nova"Herrenvolk".La 1.de majo,simbola tago de čiuj subpremitoj devas nin memorigi,ke ankoraŭ multaj popoloj apenaŭ spiras,vivante subjugitaj de diversaj ekspluatistoj.Por ili paco signifas la samon,kion ĝi estus signifinta por tiuj,kiuj vivačis en la koncentrejoj de Hitler kaj tiuj,kiuj neplu revenis el la morttrajnoj kaj gaskameroj de la "pacemaj" germanaj fašistoj. Pro tio,nia batalo por la paco estas samtempe batalo por libereco.




R.BURDA

## KAJ KION VI DIRAS HOMOJ?

Jes,vi certe bone sciaş al kiu rilatas tiu ĉi demando. Ĝi estas direktata al vi ĉiuj,al ĉiu simpla homo,al ĉiu popolo,al la tuta homaro,kaj ankaŭ al mi mem.

Sur nia planedo vivas du kaj duona miliardo da homoj krom kelkaj,kiuj ne apartenas al la homa gento,sed al la familioj de Dupant,Morgan kaj aliaj. -

La homaro vivas sur nia terglobo proksimume milionon da jaroj. De tiu tempo,kiam la homaro unua -foje levis sian kapon kaj nukon al la firmamento,multo progresis. Nun ni staras sur la sojlo de l' ebleco ŝanĝi fundamente la aspekton de nia patrina tero aŭ forlasi ĝin,aŭ serĉi alian planedon en la universo,aŭ detrui ĝin,kiu dum multaj miljaroj nutris kaj flegis niajn antaŭulojn.Tio signifas minimume sin mem pereigi kaj la tutan vivon sur la terglobo kaj lasi flugi nian planedon dum pluraj milionoj da jaroj en la universa spaco kiel globon dezertan,nur kun la restaj ruinoj de ĉio,kion la homaro dum mil -jaroj kreis. -

En tiu ĉi momento prezentiĝas sin homoj el Sovjetio,kiuj proponaŝ ŝanĝi la vizaĝon de nia nas -kiĝplanedo kaj serĉi novajn vojojn por atingi riĉecon kaj pli feliĉan estonton por la tuta homaro. -

Nun ni devas elekti - nun estas la vico je ni,ke ni decidu ! .... Kion vi diras, homaro ?

Milan JARIŠ

El LITERÁRNÍ NOVINY trad.A.SATTEK

## LA ALVENO DE L' HEROOJ

La ŝipo ĵus alvenis de Afriko.
Tra la spaliro de homplenaj stratoj
sintrene marŝas palaj la soldatoj
mangitaj de la febroj de l' tropiko.

Vivuojn oni krias......la muziko
la venkon kantas......Brilaj tiuj datoj,
en kiuj homoj,krimaj aŭtomatoj,
ricevas homajn laŭdojn de publiko.

Nur viro seriozas,kun okuloj
malgajaj,antaŭ tiom da ekscito
pro diskutindaj faktoj kaj gratuloj:

Dum multaj festas glorojn pro milito,
dum kelkaj mensas gajnojn per spekuloj,
li sentas la doloron de l' venkito. -

Saldanha Carreira

/Kopiita el HEROLDO DE ESPERANTO/

## KIE ANGLA KAMARADO VIDAS LA DANĜERON POR LA MONDO

Estas fakto,ke oni povas konstrui H-bombon de ia-ajn grandeco; oni povas konstrui bombon, kiu tute sole povus detrui la tutan loĝantaron de Britio. Via lando situas same kiel la nia, havante nenian protekton kontraŭ tiaj armiloj.Eĉ Churchill diris antaŭ kelkaj tagoj,ke"estas nenia absoluta protekto kontraŭ la H-bombo".Nun ni vidas, ke nia registaro rezervas al si la rajton uzi la H-bombon en milito,eĉ se la "malamiko" ne uzus ĝin. Kia freneza sinteno ! Sed la gvidantoj de nia Socialdemokrata Partio subtenas la registaron en tiu ĉi afero. Tiuj ĉi faktoj montras,ke la pacmovadon en Britio atendas ankoraŭ grandega laboro.Malgraŭ tiuj faktoj,mi ne multe timas pri la britaj H-bomboj,mi ne timas pri la sovjetaj H-bomboj,sed la usonaj bomboj estas alia afero. La usonaj militistoj fanfaronis pri flug -maŝinoj kiujn ili havas,pretaj por subite flugi al Sovjetio kun H-bomboj. Ĉiam,kiam okazas internacia "okazajo",multaj eminentuloj en Usono postulas militon. Estas terura fakto,ke tre multaj naciaj gvidantoj,politikistoj,militistoj kaj ĵurnalistoj en tiu lando estas stultuloj,kiuj akiris siajn postenojn per nura koruptado. Tiuj nepensuloj havas fortan influon en Usono, kaj tie troviĝas la danĝero por la mondo.

/ El letero de k-do. Ronald LYNN.

## LA HUNGARA PACKONSILANTARO APROBAS LA AGADON DE "MEM"

tio klare jam evidentiĝas el letero kiun ricevis respondе al sia salutletero k-do.R.BURDA.Jen ni prezentas al vi gian tekston :

ORSZÁGOS BÉKETANÁCS
HUNGARA PACKONSILANTARO
BUDAPEST,VI.Sztálin-ut 124 Budapesto la 28/III.1955.

Al MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO
s-o.Rudolf B u r d a
PLZEŇ,Palackého nám.č.6,
Ĉehoslovakio.

Kara amiko,

estas kun prokrasto ke ni respondas Vian interesan raporton ĉar,kiel vi povas imagi al vi,la preparoj kaj la procedo de la IVa Hungara Kongreso de la Paco okupis tutan nian tempon. Ni dankas al vi,ke vi sendis je ĉi tiu okazo la saluton kaj viajn bondezirojn.

Ni konas la organon„PACO" menciitan en via letero kaj ni scias ke la esperantistoj de la mondo tre aktive partoprenas en la monda movado por la paco. Ni konas ankaŭ tiun ĉi agadon de s-ro Pál Balkányi kun kiu ni estas en senĉesa kontakto kaj al kiu ni helpas ĉiam kun plezuro se li deziras la materialojn, la publikaĵojn koncernajn la movadon de la paco.

Ni deziras al vi multan sukceson en via laboro. Akceptu kara amiko,esprimon de niaj plej bonaj sentoj.

Katalin BUGÁR
Sekretari/in/o de la
Hungara Konsilantaro de la Paco

## M O N T E V I D E O

/El raporto de prof.Ivo Lapenna en "Revuo ESPERANTO internacia" de n-o.591 el februaro 1955/

.....kiam mi revenis al la konferencejo,la granda salonego de Palacio Legislativo,mi sukcesis trapase en granda rapideco,informi kelkajn delegaciojn,ke la PLENO voĉdonos pri la Meksikia rezolucio. Ĉiuj lokoj de la delegitoj estis okupitaj.Mankis eĉ ne unu ĉefo de delegacio. La galerioj estis plenŝtopitaj de jurnalistoj,diplomatoj kaj publiko.En atmosfero tre solena komencigis la lasta kunsido de la Oka Sesio. Mi sidis en la la-sta vico,kie sur jam malpureta tabulo estis skribite "OBSERVANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO"".

La kunsido unue aprobis kelkajn decidojn de diversaj komitatoj. Poste estis solena omaĝo al urugvaja poetino Ibarourou. Fine,ĉirkaŭ la 17.15 horo la prezidanto anoncis: "Ni transiras al la sekvanta punkto de la tagordo:La internacia peticio favore al Esperanto".En la nomo de Meksikio parolis la prezidanto de la meksikia delegacio s-ro.Vallarta.Li diris,ke li proponas la rezolucion en nova formo.Lin apogis la prezidanto de la svisa delegacio s-ro Bourgeois.Post mallonga interveno de la brita del.Sir Ben Bowen Thomas,la prezidanto d-ro. Zavala Muniz voĉdonigis la rezolucion. Tridek manoj levigis "POR",kvin estis kontraŭ,dekses sin detenis kaj la ceteraj ne voĉdonis. /Kia diferenco estas inter sindeteni kaj ne voĉdoni,eble la lastaj neĉeestis.dem.de la red./ Por la rezolucio certe voĉdonis Meksikio,Urugvajo,Svedio,Norvegio,Svisio,Nederlando,Luksenburgo,Francio,Brazilio,Britio,Italio,Grekio,Jugoslavio,Ĉinio, Aŭstrio,Honduras,Izraelio,Nova Zelando....Certe voĉdonis kontraŭ,Danlando,Egiptio,Kubo,/ vere stranga/...Certe sin detenis: Sovjetio,Bjelorusio,Polio,Ukrainio,Ĉehoslovakio,Hungario.Pri aliaj ŝtatoj mi ne estas certa. Ĉar la permana voĉdonado daŭris nur kelkajn sekundojn,ne ebligis tute preciza kontrolo

## ESPERANTO-LITERATURO EN LA ĈEFBIBLIOTEKOJ HUNGARAJ

La Hungara Landa Biblioteko de Széchenyi en Budapest,Muzeum kö- rut 14 kaj ankau la Cefurba Bib- lioteko en Budapest de Szabó Erv -in informis la peranton de MEM, k-don.Pál Balkányi,ke iliaj bib- liotekoj disponigas al interesu- loj sufiĉe ampleksan literaturon en Esperanto.Inter alia estas al dispono por la hungaraj esperan- tistoj pli ol 250 interesaj lib- roj ĉiuspecaj kaj multaj jarko- lektoj de diversaj malnovaj gaz. eldonoj.Estas permesate kopie la liston de ilia publika librokatalogo.

Estas rekomendinda,ke niaj hun -garaj gek-doj plene eluzu tiujn ĉi bibliotekojn kaj klopodu ilin ankorau kompletigi per donacoj de pluaj valoraj verkoj,kiuj eble neuzitaj kuŝas en iliaj bibli -otekoj hejme,dume aliaj suferas mankon de literaturo.

## KONTRIBUU AL DISVASTIGO DE NIA PORPACA LINGVO

Certe multaj el vi jam aŭdis pri la fama ĉehoslovaka sportulo Emil ZÁTOPEK. Li jam ricevis de oficialaj instancoj kelkajn me- ritmedalojn kaj publikajn laud- ojn. En lia naskigurbo KOPRIVNI- CE eldoniĝas la organo de ĉehos- lovakaj esp.pacdefendantoj kaj lauvice ankau la ofic.organo de MEM,"PACO".La tiea Esperantista rondeto decidis arangi ekspozi- cion de bildoj kaj gazetraportoj kiuj aperis en diverslandaj naci -lingvaj gazetoj rilate Emil Zá- topek kun la celo,gajni lin kaj aliajn famajn sportulojn por nia movado.

Se vi tian materialon trovos en viaj nacilingvaj gazetoj, ne- forgesu gin senprokraste sendi, komprenеble,akompanatan de Esp- traduko,al k-dino.Marta HRČKOVÁ, KOPŘIVNICE č.474,Morava,Ĉehosl.

Rekompence ni sendos al ĉiu la fotografion de Emil Zátopek kun lia propramana subskribo.

## NI INVITAS VIN AL DOKSY

Se vi deziras vian nunjaran li- bertempon utile kaj praktike el- uzi sub agrablaj kondiĉoj en nia granda verda familio kaj inter aliĝivaj ĉehoslovakaj esperantis- taj pacdefendantoj,do senhezite vi devas alveni al Doksy.

La SOMERA ESPERANTO KOLEGIO en Doksy ankau nunjare arangos la tradician Esperanto-kursar- on por komencantoj kaj progres- intoj,por instruistoj,oratoroj, propagandistoj ktp.La kursoj o- kazigos de la 17-30 de julio en urbeto Doksy ĉe belega lago de Macha,ĉirkaŭita de abundaj arb- aroj kaj vidindaĵoj.Krom la efi ka kaj sukcesoerta instruado,la arangantoj certe ankau zorgos pri interesa kaj gojiga progra- mo,por ke vi kiel eble plej ag- rable guu vian liberan tempon. Ankaŭ eksterlandaj gek-doj tiu- jare havas la eblecon,okaze de la SPARTAKIADO,ricevi enirper- meson por viziti la kursaron. La aligontoj guos 50% fervojra- baton. Aligu jam nun kaj petu informprospekton ĉe k-do.: Václav Špůr,ředitel Státní Spo- řitelny,DOKSY u Máchova jezera.

## KIO ABSOLUTE NE DECAS

En "HEROLDO de ESPERANTO" de la 1.marto 1955 ni legas ĉe la piedo de la lasta paĝo,sub rub- riko"NIA POŜTO" jenan noton:

„Ni ricevis petojn el Bulgar- io sendi ledon por ŝuoj,el Ĉeĥo -slovakio por sendi Nilon-ŝtrum -pojn ktp."....

Kiel statas la situacio en Bulgario,mi nepovas konstati, sed en Ĉeĥoslovakio eblas ĉie libere aĉeti Nilon-kaj Silon- ŝtrumpojn. La prezo por 1 paro estas č.40.-Kčs /1.-Kčs = 1 kaj 1/4 da intern.resp.kuponoj/ gi estas iom alta,sed oni ne devas forgesi,ke temas ne pri ĉiutaga bezonaĵo,sed luksaĵo,kiu ne es- tas nepre necesa.Sed peti tiajn ŝtrumpojn de esp-istoj en kapi- talistaj landoj,nur pro tio, ke ili estas donacaj,ĉar ja ne ek- zistas pagebleco,estas vere ne- gentila kaj ne decas al esperan tisto.La popoldem.k-doj.neforge -su,ke niaj samideanoj en kapit. landoj ankoraŭ vivas same kiel ni vivis antaŭ kelkaj jaroj,kaj ili pli rajtus peti donacojn el Popoldemokratioj ol ni de ili. Alia afero estas,peti specialan medikamenton,kiu estas ĉe ni ne aĉetebla kaj per kiu oni ofte povas savi homan vivon. Bonvolu ambaŭflanke tion noti.

R.BURDA

## ONI HONORIGIS MIN MODELA PORPACA BATALANTO

Unu el la plej aktivaj batalantoj per Esperanto por la Mondpaco estas nia k-do.Ant.FRANTL el urbo OPAVA en Cehoslovakio.Ni lasu ĉi tie rakonti lin mem:

.....estas mia devo konatigi vin, kun kiaj sukcesoj finis miaj klopodoj. Unue mi preparis ĉeokazan ekspozicion.Ĝi ampleksis ĉ.9 m/2 da surfaco.El via materialo mi uzis 31 bildojn,rilatantaj la"Sangan 1.majon en Tokio" kaj Bakteriologian militon en Koreio,krom 6 grandaj fotoj pri helpe de Esp-o en Japanio arangitaj ekspozicioj rilate Cehoslovakion.La ekspozicio vekis grandan intereson kaj ĉiuj partoprenantoj de la konferenco rigardis ĝin,multaj tre detale. Post la fino de la packonferenco mi ĝin devis pruntedoni al nia Domo de Klerigado.

La Packonferenco okazigis la 27 de februaro kaj partoprenis 205 delegitoj.Ceestis sekretario de la Centra Packomitato,k-do.Svárovský,kiu havis la ĉefan paroladon. Ĉe la estrara tablo sidis ankaŭ la generalo Ŝpinler,regiona deputito kaj parlamenta deputito k-do Pleskáč.

Sekve de mia instigo,la konferencon atingis du salutleteroj el eksterlando,de Eriksberga Packomitato el Göteborg-Svedio kaj de l Packomitato el Helsinki-Finnlando. Mi devis tuj traduki kaj la leteroj faris sian mision - ili profunde impresis la konferencanojn. La prezidanto de nia Distrikta Packomitato,verkisto F.Směja en sia jar-raporto tre detale priskribis la interŝanĝadon de leteroj inter la eriksberga kaj nia packomitatoj. Li laŭtlegis la unuan leteron de la Eriksberga Packomitato kaj la respondon de nia komitato.Mi,kun ankoraŭ du aliaj komitatanoj estis poste publike honorigitaj kiel "Modelaj Porpacaj Batalantoj".Ankaŭ mi mallonge kontribuis al la diskuto,dankante pro nia honorigo kaj fine mi solene transdonis al la prezidantaro memorkajeron,kiun sendis donace esp-istoj el la universitato de Kioto La kajero konsistis el 21 solidarecesprimoj,kiujn ili ricevis resone al japanaj deklaracioj de diversaj unuopuloj kaj korporacioj el la tuta mondo.Inter ili ankaŭ trovigis 6 el Cehoslovakio kaj eĉ el nia urbo Opava.

Lunde la 7.de marto mi prelegis en la uzino "OSTROJ"en Opava,kie ĉeestis ĉirkaŭ 100 virinoj okaze de la "Internacia Virina Tago".Dinanĉe la 13/3. mi transdonos similan memorkajeron al la Regiona komitato de kontraŭfaŝistaj batalantoj en urbo Ostrava,kie mi verŝajne ankaŭ prelegos pri la efiko de atom-kaj hidrogen-bomboj.Krom tio mi atendas inviton de Virina komitato en Opava,al kiu mi ankaŭ devos transdoni memorkajeron.La novelektita distrikta komitato de pacdefendantoj en Opava planas arangi ekspozicion en kastelo HRADEC apud Opava pri "Arto en la servo de la paco",kiu devus daŭri la tutan someron komence de la 1.majo.Estis dirite ke ankaŭ ni,la esp-istaj pacdefendantoj,devos ekspozicii tie niajn materialojn.

Mi ankaŭ instigas nian junularon,ke ĝi klopodu partopreni la Festivalon en Varsovio,ke ili aligu ne kiel esp-istoj,sed kiel anoj de la Junular-ligo k.gis en Varsovio ili koncentriĝu, por praktike montri al la aliaj, kiamaniere eblas plejfacile interkomprenigi.Ne eluzi tian raran okazon,estus granda domaĝo.

Antonín FRANTL
Veleslavínova 23,OPAVA,Ĉehoslov.

Rim.de red.: Antaŭ la red.fino ni ricevis sciigon,ke k-do.Frantl estas invitita prelegi en 5 aliaj lokoj ankoraŭ pri A-kaj H-bomboj.

## FRANCAJ GESAMIDEANOJ AL ĈSR

Laŭ letero de direktoro de la CENTRA NACIA ESPERANTO OFICEJO en Orleans,s-ano.Perre Delaire,tiu intencas elsendi kelkajn siajn lernantojn al Ĉehoslovakio por viziti nian SPARTAKIADON kaj TUTŜTATAN KONFERENCON DE ESP-PACDEFENDANTOJ en Otrokovice,kondiĉe,ke tro vigos afablaj ĉsl.gek-doj,kiuj akceptos zorgi pri ilia gastigado. Viajn proponojn skribu al k-do.K. KRAFT,Županovice,p.HŘÍMĚŽDICE u Dobříše.

ĜOJE MI SUBSKRIBIS

Venis al mi en mian residencon du - du homoj, la unua juna la alia maljuna. Ili petis mian subskribon sub la rezolucio de la Monda Packonsilantaro kontraŭ la atom-kaj hidrogen-bomboj kaj por la paco.

ĝoje mi diris al ili: Via devo karaj kamaradoj estas bela kaj granda! Vi subtenas la vivon, patrojn kaj patrinojn, vi tiamaniere gardas la homaron! Ĝoje mi subskribos. Kaj mi tuj, dankante al Dio subskribis, kiel pastro, kiel kristano, kiel membro de nia packomitato! Ĉu estas pli bela devo, ol la defendo de la paco?

Mi vokas al ĉiuj esperantistoj, subskribu ĉiuj! Kaj kunvenonte en nia TUTŜTATA, ni ekkrios en la tutan mondon: La Paco signifas vivon, milito - morton, ni volas la vivon !!!

Pastro, Alfredo MACEK
kanoniko en MIKULOV.

ĈAR ĜI ESTAS HEROLDO DE PACO

Ĉar mi apartenas al tiuj, kiuj laŭpove uzas la internacian lingvon por la granda afero de paco kaj progreso, mi legas LA PACDEFENDANTON jam de ĝia komenco kaj povas sen troigo diri, ke tiu gazeto por ĉiu pacamiko-esperantisto estas utila kaj interesa legaĵo. Utila, ĉar ĝiaj porpacaj artikoloj kaj raportoj servas kiel kompaso por trovi la ĝustan celdirekton. Interesa, ĉar la enhavo estas varia kaj ne malhavas pure poresperantajn aferojn.

Ĉar LA PACDEFENDANTO nun eniris en novan, espereble sukcesplenan jaron, mi ĉi kune volas esprimi so lidaran dankon al k-do. Burda kaj al ĉiuj aliaj ĉeĥosl. pacbatalantoj, kiuj ekonomie kaj morale kunhelpas por aperigi ĝin. Dank' al tiuj, viaj kontribuoj, ni, pacamikoj esp-istoj en la kapitalisma mondo povas legi gazeton, kiu ne nur parolas nian lingvon, sed eĉ venas el lando, kies registaro kaj popolo volas pacan kunvivadon kun ĉiuj ŝtatoj, malgraŭ aliaj socisistemoj. LA PACDEFENDANTO ja ne estas registara organo, sed ĝuste pro sia senlaca pacstrebado ĝi meritus esti subvenciita kaj presita, por pli bone povi plenumi sian rolon nacie kaj internacie. L.P. ja ĉefe estas landa organo, sed ĉar ĝi estas HEROLDO de la paco, ĝia agadkampo estas nelimigita.

En la nuna tempo, kiam la vojo de la internacia lingvo estas plena de obstakloj, L.P. faris kaj faras vere pioniran laboron kiel organizanto, propagandanto kaj instruanto. Sen LA PACDEFENDANTO la disvastigo de nova porpaca Esperanto-ideologio en Ĉeĥoslovakio ne estus ebla, ankaŭ ne la propagando de pacesperantistaj kampanjoj, inkluzive de internacia korespondado. Kaj, ke rekta kontakto perletera kaj translima povas havi grandan kulturan signifon L.P. ofte deklaris. Estas agrable konstati, ke ĝia kolega organo en Moskvo, la "NOVA TEMPO"/n-o.7,1955/ankaŭ atentigis pri ties valoro, kiel jena citaĵo en ĝia artikolo, skribita de instruistino montras:

"Antaŭ nelonge venis al nia lernejo/la mezlernejo n-o 645 en Moskvo/letero. Sur la rozkolora koverto oni vidas maldekstre la Ruĝan Placon en Moskvo kaj dekstre la Tien An Men Placon en Pekingo. La sendintadreso tekstas: Ĉinio, Pekingo, Knablernejo n-o.2 en Pekingo. La ĉinaj lernejinfanoj skribas: Ni ĉiuj konas la grandan amikecon inter Sovjetunio kaj Ĉinio Ni volas malfermi leterinterŝanĝon kun lernejinfanoj el Moskvo k. iĝi amikoj kun ili. Ni volonte volas aŭdi ion pri via vivo, pri via lernejlaboro, via libertempo...."

Kompreneble la lernantoj en nia lernejo ĝojas pro la okazo, rekte malfermi interkomunikon kun la lernantoj en Pekingo. Tiel estiĝas kaj fortiĝas la amikeco inter la juna generacio de nia lando kaj la popolreganta Ĉinio."

Ĝuste tiel kaj eĉ pli! LA PACDEFENDANTO - kiu scias la gravan rolon de rekta kontakto inter ordinaraj homoj, kiuj elektis Esp-on kiel interkomprenilon, ĉar ĝi estas facile lernebla, kaj kiuj sub la standarto de paco, demokratio, socialismo volas krei kontakton trans la limojn de ĉiuj landoj kaj kontinentoj por povi persone

ekkoni unu la alian per penso-interŝangoj - tial donigas,ke ĉiu gazetnumero montras grandan lokon guste por korespondanoj.

Kompreneble,la valoro de L.P. ankoraŭ pli riĉiĝus,se ĝi povus informi pli pri videbla utiligo /per tradukq kaj publikigo/ de artikoloj aŭ leteroj el diverslandaj pacgazetoj kaj de progresemaj esperantistoj en naciliñgvaj eldonaĵoj.

Sendube la jam atingitaj rezultoj de la pozitiva esperanto-laboro por kiu LA PACDEFENDANTO aktivadas,konvinkiĝis multajn skeptikulojn,ke la esperantistaj pacdefendantoj lojale deziras kaj strebas la kunlaboron kun ĉiuj,kiuj emas uzi la internaçian lingvon en la batalo kontraŭ novfaŝismo kaj militpreparoj,por daŭra paco kaj progreso.

G.Holmkvist,Malmö,Svedio

## GERMANA PACKOMITATO neas ESPERANTON

La 19/2.okazis en Lugau Distrikta Konferenco de pacdelegitoj al kiu la ministoj de KARL-LIEBKNECHT-WERK delegis nian k-don Rosner el Olsnitz.Malgraŭ tio,ke la estraro ne allasis de k-do.Rosner transdoni salutojn en la nomo de "MEM",tiu tamen sukcesis en libera diskuto diri kelkajn vortojn pri la alta signifo de nia internacia paclingvo,kiuj estis akceptitaj kun granda aplaŭdo de la ĉeestintoj.

En majo okaziĝos la Germana Packongreso en urbo Dresden.Per multnombra alsendo de diverslandaj salutleteroj vi povas tre efike subteni la klopodojn de niaj germ.esp-pacamikoj.Car kdo. Rozner ne sendis pli precizan daton kaj adreson,ni kredas, ke sufiĉas adresi viajn salutleterojn al: Deutscher Friedenskongres, DRESDEN,Germanio-D.D.R.

Kopion sendu al nia MEM-peranto,k-do.Helmut Löffler,Theaterstrasse 1,MITTWEIDA/Sachsen,DDR.

ĈU VI JAM EGALIGIS VIAN JARABONON POR 1955 /12.-Kĉs/? Faru tion tuj,alimaniere vi prokrastigas la eldonon de nia adresaro!!!!!

## LA TUTŜTATA KONFERENCO DE ĈEĤOSLOV.Esp.PACDEFENDANTOJ,

okaziĝos en OTROKOVICE la 7-10 de julio 1955.

Korespond adreso de la Organiza komitato estas: K-dino.F. Matušová,Krátká 812,Otrokovice /Morava/Ĉeĥoslovakio.

GASTIGADO de eksterlandaj k-doj Por koncentrigite prizorgi tiun aferon,aliĝis libervole k-do.K. KRAFT,Županovice,p.HRIMEŽDICE u Dobříše,ČSR. Al tiu k-do. jam nun aliĝu skribe ĉiuj ĉsl.gek-doj,kiuj emas kaj kapablas gastigi dum kelkaj tagoj dum nia TUTŜTATA en Otrokovice eksterlandan k-don-inon.Eksterlandaj gek-doj,kiuj deziras kaj bezonas tian helpon ankaŭ aliĝu ĉe tiu adreso jam nun skribe. En Otrokovice estos al dispono 2-3 litaj ĉambroj.Ĉsl.k-doj povas pagi liton al k-do.kun kiu ili deziros loĝi.Same povas aliĝi ĉe k-do.K.KRAFT,tiuj,kiuj pretas pagi kelkajn manĝojn aŭ tiuj,kiuj deziras por tiu celo donaci iun ajn monsumon.

ALIĜILOJ: Kun ĉi tiu n-o.estas al vi sendata la Konferenc-aliĝilo.Koncize plenumu ĉiujn demandojn kaj resendu ĝin kiel eble plej baldaŭ,sed plej malfrue la 15.de junio/ne kiel erare estas presite julio/,al la Organiza Komitato/supre menciita adreso/ Sur la aliĝilo estas menciitaj 2 kaj 3litaj ĉambroj en hotelo. Tio signifas,ke 2-3 personoj komune luos unu ĉambron,sed nur unu el ili mendos la ĉambron k. notos sur la aliĝilo ties adresojn.Se vi ne havas kunloĝantonmendu nur 1 liton kaj la Org.K. mem sendos al via ĉambro kunloĝanton.La Aliĝilo nur valoras, se ĝi estas akompanata de 10 Kĉs konferenckotizo kaj mendopago de loĝado.Manĝadon ne necesas mendi antaŭe.

KOLEKTIVA LOĜADO en puraj kaj bele ekipitaj studentaj k.laboristaj kolegioj estas limigitaj, /nur por ĉ.100 personoj/1 lito po tage por 8.-Kĉs/Ĝin povas ricevi tiuj,kiuj unue aliĝos.Sed ankaŭ la hotelaj ĉambroj estas I. klasaj kun banejo kaj ankaŭ por akcepteblaj prezoj. /daŭrigo 8.p.

NIA TUTŜTATA/daŭrigo/

Kiu povas partopreni nian TUTŜTATAN ? ĉiuj esp-istoj,kiuj simpatias kun nia batalo per Esp-o por la mondpaco,eĉ se ili ne ankoraŭ estas abonantoj de niaj organoj.Tiuj gek-doj.petu aligilon rekte ĉe la Organiza Komitato en Otrokovice aŭ ĉe nia redakcio.

FERVOJRABATO: Ni forte esperas, ke ni ricevos 50 % fervojrabaton Pri tio ni ankoraŭ vin informos.

FAKAJ KUNVENOJ:Ankoraŭ akceptis gvidi kunvenon de religianoj pastro,kanoniko A.Macek el Mikulov.

I.ESPERANTA MESO POR PACO EN ĈSR:

En la kadro de nia TUTŜTATA okaziĝos dimanĉe la 10/7de 8-9 horo la unua porpaca esperantlingva meso en katolika preĝejo de Otrokovice.Predikos kanoniko Alfred Macek el Mikulov.

INTERNACIA PUBLIKA MITINGO:ĝi okaziĝos,se aliĝos sufiĉe da eksterlandaj gek-doj,kiuj pretos paroli kaj transdoni pacsalutojn al neesperantista publiko. Por kompletigo de viaj informoj,legu ĉiam la raportojn en la antaŭirintaj numeroj de nia organo.

SOMERA ESP-KURSARO EN PŘÍBOR

Kiel pasintjare,ankaŭ tiusomere okaziĝos en Příbor denove la konata Esperanto-kursaro.Ĉiuj ge-k-doj,kiuj deziras ĝui 14 agrablajn tagojn dum monato julio k. ekkoni la regionon de L. Janáček kaj Fr.Palacký kun siaj belaj naturaj vidindaĵoj,aliĝu jam nun kaj petu detalajn informojn ĉe: K-do.Antonín SATTEK,Dvořákova č. 744,PŘÍBOR,Morava.

P R O P O N O

K-do.A.Sattek el Příbor proponas ke nia organo publiku regule rubrikon por instruistoj,en kiu ti-uj raportus pri siaj varb-kaj-instrumetodoj inter lernejinfanoj kaj ceteraj spertoj.Se aliĝos ankoraŭ pluraj instruistoj,pretaj,provizi nian redakcion per raportoj,ni akceptos volonte, ĉar tia rubriko povus multe kontribui al nia movado.

E L G E R M A N I O /DDR/

Nia Esp-movado ree ekfloras.Formiĝas amikaj rondetoj sen oficiala aprobo.Kursoj funkcias jam en Dresden,Pirna,Radebeul kaj en Zwickaŭ-Planitz.Instruas spertaj,malnovaj kamaradoj.Ni klopodas atingi la rajton,publike propagandi kaj fondi grupojn.

P.Gl.Pirna-Copitz

E L B U L G A R I O

La 27.de marto okazis ĝenerala kunveno de la Esp-societo "RADIO" en urbo PAZARĜIK.Ĉeestis 18 gek-doj kaj 3 delegitoj de la Esp-societo "Maksim Gorki" el Sofia.Montrigis nesufokebla volo,labori por Esperanto.

C. Murgin

La Esp-societo "Maksim Gorki" en Sofia jam tom post iom plenumas siajn deciđojn el la jarkunveno.La 20.de marto ni sukcesis malfermi Esp-kurson en la Ŝtata Universitato de Sofia kun pli ol 50 gelernantoj.Ĉiu aktivulo jam estas ŝarĝita per iu tasko.Mi mem verŝajne zorgos pri distribuado de la PACDEFENDANTO aŭ PACO en Sofia.

Petko Arnaudov

E L P O L I O

La 17.de aprilo okaziĝos en Varsovio nia landa esperantista kunveno.Al Polio estas nun ekspedataj pli ol 50 ekz.de la MEM-organo "PACO"kaj krome petis de ni k-do.Z.Glajcar pluajn 10 ekz.de LA PACDEFENDANTO por kiuj li jam trovis interesulojn

Estas videble,ke niaj gekamaradoj en popoldemokratiaj landoj jam fakte klopodas restarigi la esperantistan pacmovadon kaj ni, ĉiuj,dezirás al ilia laboro baldaŭan sukceson kaj venkon de ĉiuj malfacilaĵoj.

MUNICIO POR NIA BATALO

| | | |
|---|---|---|
| K-do.M.Závodský-Žilina... | 20 | Kčs |
| k-do.ing.V.Jonáš-Ústí n/L. | 8 | " |
| k-do.M.Szmigiel-Cheb..... | 8 | " |
| k-dino.R.Kaplerová-Brno.. | 20 | " |
| k-do.L.Plavec-Hříměždice. | 5 | " |
| k-do.V.Růžička-Děčín..... | 3 | " |
| k-do.J.Solnický-Opava.... | 3 | " |
| k-do.P.Sittauer-Lipolec.. | 8 | " |
| k-do.M.Ther-Police n/Met. | 3 | " |
| k-do.G.Nilson-Vigbyholm pagis du jaraboonojn de PACO por ĈSR. | | |
| k-do.A.Frantl-Opava..... | 11 | " |
| k-do.J.Rosner-Brno....... | 8 | " |
| k-do.J.Windisch-Brno..... | 5 | " |
| k-do.J.Hanyš-Karl.Vary... | 8 | " |

Pro manko da loko ni publikos la ceterajn donacojn en maja n-o.

# E S P E R A N T O - R A D I O - K A L E N D A R O

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro.G.Langlantier, 29 Bd.Murat, PARIS 16,Francio. La horoj de dissendo estas laŭ mezeŭropa tempo.
Mallongigoj: I=informoj, P=parolado, K=kurso.

| Tago: | horo: | ondlongeco: | sendstacio kun adreso: |
|---|---|---|---|
| Lundo | 13.30-14.00 | 250m P.K. | Radio Juventud,Real 71,La CORUÑA, Hispanio. |
| Mardo | 12.55-13.00 | 48.66m P.<br>31.46m<br>16.87m | Radio-Bern,d-ro.Baur, Kurzwellendienst,Neuengasse 23, BERN,Svisio. |
| | 15.30-15.45 | 280m P. | Radio Ministerio Ganaderia y Agrikultura,MONTEVIDEO,Urugvajo. /nur la unu-a mardon en monato/ |
| | 18.35-18.40 | 48.66m P.<br>31.46m<br>25.61m | Radio-Bern,Neuengasse 23,Svisio. |
| | 20.15-20.30 | 288m I. | Radio Carlet,VALENCIA,Hispanio. |
| Merkrede | 16.30-16.40 | 203m I.P.<br>48m,41m,<br>30m,25m. | Radio-Wien.Aŭstrio. |
| | 17.00-17.10 | 205m I. | Radio Polo Norte,CARAMULA,Portugal |
| | 19.10-19.25 | 49.92m P.<br>31.35m | Radio-Roma,Casella postale 23, ROMA,Italio. |
| | 20.30-20.45 | 360m I.P. | Radio Union,Emisora del Frente de Juventudes,BARCELONA,Hispanio. |
| | 23.05-23.15 | 513m I.<br>48.74m<br>25.46m | Radio-Wien,Argentinierstrasse 30a WIEN IV,Aŭstrio. |
| | 23.15-23.20 | 402m I. | V.A.R.A.Heuvellaan 33,HILVERSUM, Nederlando. |
| Ĵaŭdo | 8.45-9.00 | 202m K. | Radio-Perpignan,ROUSSILLON,Francio /Pyr.Or./ |
| | 9.30-9.45 | 348m K. | Esperanto-Office,ORLÉANS,/Loiret/ Francio. |
| | 12.35-13.00 | 48.66m P.<br>31.46m<br>16.87m | Radio-Bern,Kurzwellendienst, Neuengasse 23,BERN,Svisio. /parolas d-ro.Privat/ |
| | 18.35-18.40 | 48.66m P.<br>31.46m<br>16.87m | Radio-Bern /la sama adreso/ /parolas d-ro.Privat/ |
| | 19.45-20.00 | 202m K. | Radio-Perpignan/adreso kiel supre/ |
| | 23.10-23.50 | 200m I.K. | Radio-Alerta,Colon 11.VALENCIA,Hisp. |
| | 23.50-24.10 | 264m I. | Radio-ZAGREB,Jugoslavio. |
| Vendrede | 19.10-19.25 | 49.92m P.<br>31.35m | Radio-Roma /adreso kiel supre/ /parolas d-ro.Musella/ |
| | 20.15-20.30 | 288m I. | Radio-Carlet /adreso kiel supre/ |
| | 22.30-22.45 | 470m I.<br>197m,47m,<br>30.50m. | GVATEMALA,Cd,Radio-Esperanto, La Voz de Quatemala,Meza Ameriko. |
| Sabato | 9.30-10.00 | 375m K.I.<br>30.71m | Radio Ministerio da Educacão, RIO DE JANEIRO,/DF/ Brazilio. |
| | 23.15-23.20 | 298m P. | Radio-Hilversum,K.R.O.Emmastraat 52 Nederlando. |
| Dimanĉe | 24.00-24.30 | 264.8m P. | Radio-Bilbao,Rodrigues Arias 6-4, BILBAO,Hispanio. |

Por ankoraŭ pli ampleksigi la Esperanto-Radio-Kalendaron,estas dezirenda,ke niaj legantoj amase,individue kaj grupe raportu pri la aŭdebleco al la radiostacioj kaj sendu salutleterojn kun multaj subskriboj.

## NIA MOVADO EN ČEHOSLOVAKIO

PŘÍBOR, ni kunvenas dufoje monate, ĉiam jaŭde de 18.h.en bele ekipita ejo de Uzina klubo TATRA. En la dua 8jara mezlernejo ni fondis rondeton kun 18 gelernantoj. Ĉiu merkrede funkcias kurso posttagmeze dum 2 horoj laŭ "ĈE"-metodo. La rondeto estas gvidata sub devizo, "Kamaradecon inter infanoj de popoldem.ŝtatoj". K-do. A.Sattek varbis 10 novabonantojn por "La Pacdefendanto" en Příbor.

KOPŘIVNICE, ĉirkaŭ 5-10 gek-doj. regule kunvenadas ĉiu merkrede en la Sindikata klubo de la uzino TATRA. Okazas konversacio kaj legado de Esp-gazetoj. Ĉiujn decidojn ni protokolas kaj kontrolas. Estis arangita Esp-ekspozicio kiun vizitis ĉ.1.200 homoj. Ankaŭ ni kompletigas nian ekspozicion en la urba muzeo.

MLÝNY p.Kytlice, en nia vilaĝo estas nun entute 3 esp-istoj, sed baldaŭ ni intencas fondi rondeton kaj arangi kurson. K.Svoboda.

BRNO, la 12.de aprilo okazigis memore al la 38.mortotago de L.L Zamenhof, funebra koncerto en la Spegula halo de hotelo "SLOVAN". De la 3/7.-13/8. okazigos subtendaraj kursoj por junularo en bela regiono de la Vranov-digo.

MARTIN, La 15.de februaro fondigis Esp-rondeto, kies anoj ĉefe rekrutiĝas el okupitoj de la uzino de J.V.Stalin. Ni kunvenadas ĉiu vendrede de 18.h.en la uzina klubo "Stalinovec". ĉiu marde kaj vendrede funkcias kurso de 19.h. kun 30 gelernantoj. Ni laboros per Esp-o. sur sindikata bazo. Ĉar ni renkontigas ankoraŭ kun gravaj malfacilajoj, ni bezonas vian helpon: Salutleterojn, cirkulerojn, bultenojn, Esp-ajojn ktp. Ni tre ŝatas rilati kun aliaj rondetoj kaj bonvenigos ĉiujn gastojn en nia klubo. Kontaktu kun nia sekr. k-do.E.V.Tvarožek, Hviezdoslavova 2/III., MARTIN, Slovakio.

MIKULOV, fondigis rondeto kun sep anoj sub gvido de k-do.A.Macek, pastro kaj kanoniko en Mikulov. La rondeto funkcias kiel fako de la Distrikta Packomitato, kies prezidanto ankaŭ farigis membro kaj lernas diligente Esperanton.

NOVÝ BOR, en marto festis nia k-do Richard WENZEL, la nuna gvidanto de la nove fondita loka Esp-movado, sian 25jaran esperantistigon. Ni ĉiuj al li elkore gratulas kaj Esp-o vivu en Nový Bor!

## KORESPONDI DEZIRAS:

K-do.Frant.VOLDŘICH, celnice, HOR. DVOŘIŠTĚ, okr.Kaplice, Čehoslovak. pri lingvoj, kulturo kaj antologio de Oriento kaj Afriko. Pri filmo, teatro kaj muziko. Ankaŭ angle, ruse kaj france. Certe resp.

K-do.Traiko Georgiev POLEV, N.Š. Z.O., "Hristo Botev", pod A., TIRNOVO, Bulgario, kun ĉiuj landoj.

K-do.Petr HOKR, Na Roudné 10, PLZEŇ, Čehoslovakio, interŝangas Esp-glumarkojn, il.p.k.kaj portretojn de filmartistoj. Resp.certe.

PACKOMITATO, interesas pri interŝango de raportoj kaj nacilingva pacprop.materialo, fotoj, afiŝoj k.t.p. Skribu al: Ortsfriedensrat, Einsteinstr. RADEBEUL I., Germanio, D.D.R. kaj klopodu ligi kontakton. Vi multe helpos al niaj germ.esp-pacanikoj.

K-do.Georges VANBREUSE, profesoro, Ma Campagne, VERVIERS, Belgio, serĉas gekoresp. por siaj 40 gelernantoj/speciale el Popoldemokrat./

Pli ol 50 gestudentoj de la Ŝtata Universitato en Sofia, kiuj lernas nun Esp-on, deziras koresp. pri diversaj temoj kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Adreso: K-do.Boris Stojanov Ovĉarov, Str.Tunga N-o.50, SOFIA 6, Bulgario. Resp.certa.

INTERSTENO ideala por la lingvo Esperanto. RAPID-SKRIBO por tre ŝpari tempon kaj penon en la skribado. STENOGRAFIO, por profesiuloj kaj debatoj. Interesatoj skribu al : C.FIELDING, 61, Phyllis Crescent, Ely, CARDIFF, Anglio.

NEFORGESU RENOVIGI LA JARABONON! Por L.P.= 12.-Kčs, por PACO=13.-

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO.TATRA, n.p.KOPŘIVNICE
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA, Palackého nám.č.6, P L Z E Ň, ČSR.